



The Esperanto Society of New York invites you to its annual Zamenhofa Festo!

DATE: Friday, December 15, 2006, 6:30-9:00 pm

PLACE: United Federation of Teachers,
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC



PROGRAM: Buffet dinner! Singing! Fun! Ni diskutos nian karan fondinton, kies naskiĝtago estas la 15-a. (Election of officers for the year 2007 at 7:30 pm)



MENU: Feel free to bring a main or side dish, dessert, or beverage to share. Please call Rochelle F. Grossman at 718-457-1490 to see what we need. ★



Protokolo de la kunveno de la 17-a de novembro 2006

Stuart GREEN oficiale malfermis la novembran kunvenon je la sepa horo kaj kvarono. Li bonvenigis al ĉiuj. Ĉe estis unu gasto, Davido McLAUGHLIN, kiu lernis pri Esperanto en libro skribita en la irlandana lingvo. Li fakte instruas la irlandan en kurso en Long-Insulo. Ĉiu el ni prezentis nin al Davido. La protokolo de la oktobra kunveno estis akceptata.

Sekvis anoncoj. Tomaso ECCARDT parolis pri la laboro de la kandidatiga komitato. Ĉiu ano de la estraro inten-

cas resti en sia posteno, krom Rochelle F. GROSSMAN. Al ŝia posteno, tiu de la koresponda sekretariino, proponas sin Marta BERGONZOLI. Nancee MEDRANO helpas Martan pri poŝtado de la *Prismo*.

Ni poste diskutis peton al ni de niĝeriano studanta en Londono. Li petas, ke ni subskribu rekomendan leteron por li. Ni decidis skribi al la Londona Esperanto-societo por lerni pli pri li.

Tiam Tomaso prezentis prelegon pri la problemo de troloĝateco en la

mondo. Fine, Stuart oficiale fermis la kunvenon je 9:09. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

Esperanto ce IBM Centro

La trian de decembro, naŭ novjorkaj geesperantistoj renkontiĝis en IBM Centro por babili. Oni parolis pri politiko, kaj pri la diferenco inter "atismo" kaj "itismo," du gramatikaj skoloj pri la Esperantaj participoj. ★

- Tom ECCARDT



Sekvas la dua parto de mia traduko de la rakonto "Lasu tion al Jeeves" de P.G. Wodehouse. En la unua parto, Bertie klarigas, ke lia servoisto, Jeeves, estas speco de genio. Li ankau rakontas pri sia amiko, Corky, kiu volas edziĝi kun aktorino, kio certe malplaĉas lian riĉan onklon, kaj eble perdos al li la heredaĵon.

— Tom ECCARDT

Lasu tion al Jeeves II

Do, iun posttagmezon, kiam Corky enfluetis mian apartamenton, engvidanta junulinon antaŭ si, kaj diris, "Bertie, mi prezentas al vi mian fianĉinon, Fraŭlino Singer," la aspekto de la afero kiu frapis min unue estis precize tio pri kio li venis por konsulti min. La unuaj vortoj kiujn mi prononcis estis "Corky, kio pri via onklo?"

La kompatindulo eligis etan malgajan ridon. Li ŝajnis anxie kaj maltrankvile, kiel homo kiu sukcese faris la murdon, sed ne povas elpensi kion fari kun la kadavro.

"Ni timegas, Sr-o Wooster," diris la junulino. "Ni esperis, ke vi sugestos manieron malkaŝi tion al li."

Muriel Singer estis tipa trankvilega junulino kiu iel rigardas vin per siaj okulegoj kvazaŭ ŝi pensus, ke vi estas la plej bona ulo de la mondo kaj ŝi ne komprenis kial vi mem ĝis nun ne agnoskis tion. Ŝi sidadis malkuraĝe, rigardante min kvazaŭ ŝi dirus al si "Ho, mi esperegas, ke tiu ĉi granda fortikulo ne damaĝos min." Si komunikis al viroj protekendan aspekton, kaj igis ilin deziri preni ŝian manon kaj diri "ho, vi kompatindulinetol!" aŭ similajn vortojn. Ŝi igis min senti, ke ne ekzistas io ajn kion mi ne farus por ŝi. Ŝi tre similis al unu el tiuj ŝajne malkulpaj usonaj drinkaĵoj kiuj kaŝe enfluas vian sangosistemon tiel ke, antaŭ ol vi komprenas tion, kion vi faras, vi jam komencis reformi la mondon, perforte, se necesas, kaj paŭzante por diri al tiu granda viro ĉe la angulo ke, se li daŭre rigardos vin tiamaniere, vi nokaŭtos lian kapon. Mi volas diri, ke ŝi sentigis min vigle kaj elegante, kiel kavaliro vaganta aŭ io tia. Mi sentiĝis devontigite al ŝia afero ĝis la fino.

"Mi ne komprenas, kial via onklo ne estus plaĉegita," mi diris al Corky. Li opinios, ke Fraŭlino Singer estas ideala edzino por vi."

Corky rifuzis gajigi.

"Vi ne konas lin. Eĉ se li ŝatus Muriel, li ne agnoskus tion. Tia obstinulo li estas. Li laŭ principo kalkitrus. Ĉio, kion li prenus en la kalkulo estas, ke mi faris grandan paŝon sen peti lian konsilon, kaj li aŭtomate koleriĝegos. Estas lia kutimo."

Mi streĉis mian balonon por pripensi tiun urĝecon.

"Vi volas aranĝi, ke li ekkonu Fraŭlinon Singer sen scii, ke vi konas ŝin. Tiam vi alvenos, kaj..."

"Sed kiel mi povas tiel aranĝi tion?"

Mi vidis la punkton. Jen la ruzo.

"Ekzistas nur unu faredaĵo," mi diris.

"Kiu faredaĵo?"

"Lasi tion al Jeeves."

Kaj mi sonorigis.

"Sinjoro?" diris Jeeves, iel materialigante. Unu paralelepipedo pri Jeeves estas, ke krom se oni observadas lin kiel falko, oni malofte vidas lin eniri ĉambron. Li similas tiujn kuriozulojn en Hindujo kiuj dissolvas sin en aeron, zomas tra spaco senkorpe, kaj rematerialiĝas precize kie ili deziras. Mi havas kuzon, kiu estas tiel nomata Teosofiano, kaj li diras, ke li ofte preskaŭ atingis tian

agadon, sed ne tute sukcesis, sendube ĉar li en sia juneco manĝis je bestoj mortigitaj en kolero kaj en pasteĉo.

La momenton kiam mi vidis lin starantan tie kun respekta atento, ŝarĝo ŝajne falis de sur miaj ŝultroj. Mi sentiĝis kiel perdita infano kiu ekvidas sian patron malproksiman. Io pri li donis al mi memfidon.

Jeeves estas altema viro kun malhela, saĝeca vizaĝo. Lia okulo glimas per la lumo de pura inteligenteco.

"Jeeves, ni bezonas vian konsilon."

"Ege bone, sinjoro."

Mi distilis la doloregan kazon de Corky en kelkajn selektitajn vortojn.

"Do, vi vidas la tutajn, Jeeves. Ni deziras, ke vi sugestu planon per kio Sr-o. Worple povu ekkoni Fraŭlinon Singer sen ekscii, ke Sr-o Corcoran jam konas ŝin. Ĉu vi komprenas?"

"Perfekete, sinjoro."

"Nu, penu elpensi ion."

"Mi jam elpensis ion, sinjoro."

"Jam!"

"La projekto kiun mi sugestus ne povas malatingi sukceson, sed ĝi enhavas ion kio eble ŝajnos al vi kiel malavantaĝo, sinjoro, ĉar ĝi postulas certan financan elspezon."

"Li volas diri," mi tradukis por Corky, "ke li havas intergalaksian ideon, sed ke ĝi kostos iom."

Komprenabe, la vizaĝo de la kompatindulo malgajigis, ĉar tio ŝajne kolapsigis la tutajn. Sed mi restis ankoraŭ sub la influo de la trista rigardado de lia fianĉino, kaj mi vidis, ke precize tie ĉi mi povus ekroli la kavaliron vagantan.

"Vi rajtas kalkuli je mi por ĉia tio, Corky," mi diris. "Mia plezuro. Daŭrigu, Jeeves."

"Mi sugestus, sinjoro, ke Sr-o. Corcoran profitu de la ornitologia hobbio de Sr-o Worple."

"Kiel diable vi eksciis, ke li interesiĝas pri birdoj?"

"Pro la eco de la konstruado de novjorkaj apartamentoj, sinjoro. Tute malkiel niaj londonaj domoj. La vandoj inter ĉambroj havas la plej malfortikan econ. Tute sen deziri subaŭdi, mi foje aŭdis Sr-on Corcoran esprimi sin kun fortegeco pri la temo kion mi menciis."

"Ho, nu?"

"Kial la fraŭlino ne verku malgrandan volumon, titolota, ni diru, 'La infanlibro pri amerikaj birdoj,' kaj dediĉu ĝin al sinjoro Worple? Limigitan eldonon oni povus publikigi je via kosto, sinjoro, kaj grandan parton de la libro oni povus asigni al laŭdaj komentoj koncerne la pli grandan traktadon de Sr-o Worple pri la sama temo. Mi rekomendus la sendadon de prezentan ekzempleron al Sr-o Worple, tuj post eldonado, akompanota de letero en kiu la fraŭlino petas permeson konatiĝi kun tiu al kiu ŝi tiom ŝuldas. Tio produktos, mi imagus, la deziratan rezulton, sed, kiel mi diras, la elspezo estus konsiderinda."

Mi sentiĝis kiel la posedanto de hundo en vodevila akto kiu ĵus efektiviĝis sian lertajon sen problemo. Mi ĉiam vetis por Jeeves, kaj mi sciis, ke li ne desaponos min. Mi ĝis nun neniam kaptis la kialon, ke tia homo kun sia genio kontentas pri restadi kaj gladi miajn vestaĵojn kaj tiel plu. Se mi havus duonon de la cerbo de Jeeves, mi provus iĝi ĉefministro aŭ simila respondeculo.

"Jeeves," mi diris, "tio estas absolute translima! Unu el viaj plej bonaj klopodoj."

"Dankon, sinjoro."

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Decembro 2006

15

ZAMENHOFA FESTO

Buffet dinner; elections

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Januaro 2007

7

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuajoj por Prismo 160)

19

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

La junulino protestis: "Sed mi certe ne povus verki libron pri io ajn. Mi eĉ ne povas skribi bonajn leterojn."

"La talentoj de Muriel," diris Corky, kun tuseto, "situas pli ĝuste en la flanko de dramo, Bertie. Mi ne menciis antaŭe, ke unu el la kialoj de nia eta nervoseco pri kiel Onklo Alexander ricevos la novaĵon estas, ke Muriel estas en la horo de la spektaklo 'Elekto vian eliron,' ĉe la teatro Manhattan. Estas absurde malbonsense, sed ni ambaŭ sentas, ke tio pligrandigus la naturan tendencon de Onklo Alexander de kalcitri kiel bovo."

Mi komprenis lian punkton. Dio scias, ke jam estis sufiĉe da kvereloj en nia familio kiam mi provis interedziĝi kun muzikkomikistino antaŭ kelkaj jaroj. Kaj estis ankoraŭ freŝa en mia menso la rememoro de la sinteno de Onklo Agatha pri la afero de Gussie kaj la vodevilulino. Mi ne scias la kialon -- eble psikologo povus klarigi tion -- sed geonkloj, kiel klaso, ĉiam terure kontraŭstaras la dramon, legitiman aŭ ne. Ili ŝajne ne povas toleri ĝin je iu ajn prezo.

Sed Jeeves havis solvon, komprenabe.

"Mi imagas, ke estus simpla afero, sinjoro, trovi iun senmonan aŭtoron kiu volonte faros la kompiladon de la volumo kontraŭ malgranda rekompenco. Estas necese, nur ke la nomo de la junulino aperu sur la titola paĝo."

"Estas vere," diris Corky. "Sam Patterson farus tion kontraŭ cent dolaroj. Li verkas unu romaneton, tri rakontojn, kaj dek mil vortojn de serioĵo por tut-fikcia gazeto ĉiun monaton kun malsama nomo." Tio ĉi estus bagatelo por li. Mi kontaktos lin tuj."

"Bonege!"

"Ĉio en ordo, sinjoro?" diris Jeeves. "Ege bone, sinjoro. Dankon, sinjoro." ★

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Scott Page
(212) 663-4896

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 813-2495

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 159 – Decembro 2006

ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York